

Miroslav Malovec



**La vivo kaj verko de  
Jan Werner (1933-2021)  
aŭtoro de fakaj tekstoj  
en Esperanto**

# Lokoj, kie Jan Werner vivis kaj studis

## Infanaĝo

Inĝeniero Jan Werner naskiĝis la 5-an de februaro 1933 en **Návsí** en distrikto Frýdek-Místek. Lia patro estis tajloro, la patrino mastrumadis hejme. La fruan infanaĝon Jan travivis en **Jablunkov** ĝis 1938, kiam la regiono estis okupaciita de Pollando. La familio devis foriri kaj revenis al **Horní Heřmanice**, de kiu devenis la patro.



# Junaĝo kaj studado

Post la milito ili transloĝiĝis al **Lanškroun**, kie Jan jam en septembro 1945 kiel 12-jara komencis frekventi gimnazion, parte ankaŭ en **Česká Třebová**. Post abiturientiĝo en 1952 kiel 19-jara li ekstudis en **Brno** konstrufakan universitaton, kiun li finis en 1957 en sia 24-a jaro.



# Profesio



Tri jarojn li laboris en **Ostrava-Kunčice** ĉe konstruado de nova metalurgia entrepreno (Nová huť Klementa Gottwalda) en pluraj funkcioj de konstruktejo. Poste, jam kun edzino Věra, li foriris al **Košice**, kie estis konstruata orientslovaka ferfabriko, kaj restis tie ses jarojn. Tiam naskiĝis al li filino Petra kaj filo Michal. En 1966 li revenis al **Brno**, al direktorejo de industria konstruadoj. En 1970 okazis politikaj enketoj, kiujn li deklaris neleĝaj, kaj estis punita per maldungo, sed ricevis laboron en produkta uzino de la sama entrepreno, kun malaltigita salajro. Ĉi tie li restis ĝis 1990, poste li sukcesis ricevi postenon de instruisto en konstrufaka fakultato de teknika universitato en Brno, kie li docentiĝis kaj fine emeritiĝis. La 20-an de januaro 2021 li forpasis.



## Kluba teatro en Brno



Sur la unua foto ni vidas la junularon de Brno en la 1950-aj jaroj, la plej alte meze malantaŭe estas Werner, ture maldekstre Josef Cink kaj antaŭe dekstre sidas Věra Podhradská, iama asocia prezidantino, kiu forpasis antaŭ du jaroj kiel 80-jarulino. La meza foto montras amikojn Werner kaj Cink kaj la dekstra kluban sceneton, en kiu aktoris Jan Werner. La junularo preparis kelkajn teatraĵojn, ekz. Ondro kaj drako de Viktor Dyk, Urso de Anton Čechov, Kara paĉjo de F.X. Svoboda k.a.

# FAKA AGADO



Kiel plenkreskulo li aktive gvidis scienc-teknikan sekcion, unue de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, post 1969 de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Li eldonadis **TS-Infomilon** por la membroj. Li tre okupiĝis pri terminologio, kiel montras lia **Esperanta terminaro de terminologia fako** kaj **Terminologia kurso**. Rezulto de lia editora laboro estas **Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio**, kiun li faris el slipoj de Stanislav Kamarýt.

# Memstaraj artikoloj

Kompreneble, li ne nur verkadis librojn, sed ankaŭ unuopajn artikolojn, kiuj aperadis en diversaj publikaĵoj aŭ estis prezentitaj buŝe.

- En Esperanto-klubo Brno en la periodo 1953-2014 li prezentis pli ol 100 prelegojn pri diversaj temoj, ne nur fakaj
- Por Informilo de Asocio de Esperantistoj Handikapuloj li verkis 40 Lingvajn Angulojn pri gramatikaj malfacilaĵoj
- Plurfoje li gajnis premion en Belartaj Konkursoj de UEA en la branĉo Eseo
- Liaj artikoloj aperadis en Scienca Revuo, kajeroj de AEST, La Domo, Fervojfakaj Kajeroj kaj aliaj
- En lia komputilo konserviĝis ĉirkaŭ 250 artikoloj, plejparte fakaj, kiuj estis iamaniere publikigitaj en la pasinteco.
- Li redaktis plurajn kolektojn de TAKE pri konstru-fakaj temoj
- Gvidis Konstru-Forumon, kies rezultoj troviĝas en la interreto



# PROPAJ FAKAJ ELDONAĴOJ

Post falo de komunista reĝimo li povis eldonadi proprajn verkojn aŭ proprakoste aŭ ĉe privataj esperantistaj eldonistoj.



# Beletra verkado



Jan Werner ne evitis ankaŭ beletron, kelkajn tradukojn en kunlaboro kun Věra Muchnová (1955-2016) el Písek. Tri romanojn li eldonigis libroforme, en *Versa Neversa Mozaiko* estas liaj mallongaj laboraĵoj.

# Amiko Josef Cink (1933-2011)

De junaĝo Jan Werner kaj Josef Cink estis amikoj, jam kiel gimnazianoj en Lanškroun kaj kiel universitataj studentoj en Brno, ambaŭ aktive kunlaboris en E-junularo. Josef Cink poste famiĝis kiel aŭtoro de junularaj kantaretoj, korespondaj kursoj kaj ekzerclibro kun blua stelo kaj ankaŭ kiel tradukanto de poezio. Kiam li forpasis en 2011, Jan Werner transprenis de la familio la esperantlingvan postlasaĵon de Josef Cink kaj prilaboris kaj eldonigis lian Frazeologian vortaron.



## Kluba kaj asocia agado

Jan Werner laboris en Esperantista klubo en Brno, en la jaroj 1971-1972 eĉ kiel kluba prezidanto. Li gvidis kursojn, prelegis pli ol 100-foje. Membro de ĈEA li estis ĝis 1993, kiam li ekŝiĝis protestante, ke la konferenco de scienc-teknika sekcio okazis dum la asocia kongreso en Karlovy Vary, pri kio li ne sciis kaj ne konsentis kun la rezultoj de la konferenco. En 2004 li organizis en Brno konferencon omaĝe al Verda Duopo Josef Vondroušek kaj Vilibald Scheiber, kiuj naskiĝis en 1904. En 2002 li fondis novan organizon *Societo por internacia lingvo Esperanto en Brno* (SILE), kies agadon li planis kiel pli intelektan kaj sciencan ol agadon de ĈEA kaj de ĝiaj kluboj. En 2006 li fondis *Esperantologian kaj Literaturan Forumon* (ELFo), per kiu li klopodis aktivigi esperantistojn, kiuj kapablas labori literature kaj terminologie. Ĝis decembro 2008 li sendis 22 leterojn pri la aktivadoj kaj ĉesis, malkontenta pri la laboro de la ceteraj ELF-anoj. Li kunlaboris kun AEH, gvidis kursojn en Skokovy kaj por la Informilo de AEH verkis kvardekon da lingvaj anguloj pri diversaj gramatikaĵoj erare uzataj de ĉeĥaj esperantistoj.

# Internacia faka agado

Kiel konstru-fakulo li engaĝis sin en la agado de TAKE, Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj, kies jarkolektojn 2005 kaj 2010 li redaktis, al aliaj kontribuis artikole. Li kunlaboris precipe kun la nederlanda membro Fabien van Mook (nask. 1971), kun kiu li kunverkis 31 leterojn Konstru-Forumo (2005-2011), kiuj troviĝas en la retejo de Fabien van Mook <http://fabien/galerio.org/kofo/> . Liaj artikoloj aperadis ankaŭ en Scienca Revuo, La Domo, Fervojfakaj Kajeroj, Belartaj Konkursoj, kolektoj kiel AEST, Akademias Studoj, Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko. En lia postlasaĵo estis trovita ankaŭ provo pri Arkitektura Enciklopedio, bedaŭrinde nur litero A. Multajn verkojn li lingve kontrolis kaj restis en la fono, ekz-e ĉe *Gastronomia Vortaro Ĉeĥa-Esperanta* de Marie Ribasová kaj Margit Turková.

Tiujn siajn artikolojn, kiujn li konsideris plej gravaj, li kolektis en sia libro *Konstrufaka Kolekto*, kiun i jam menciis.

# Lastaj jaroj

En lastaj jaroj li evitis nian klubon, laboris individue kaj kiam li tamen kontaktis nin, estis tre kritikema kontraŭ ĈEA, UEA, Akademio de Esperanto, simple kontraŭ la tuta movado, kiun lia opinie gvidas kaj fuŝas diletantoj. Eble tiun atakemon kaŭzis ia latentata malsano, ĉar komence de 2020 li estis trafita de apopleksio, post kiu li parte perdis memoron. Feliĉe li memoris min kaj lia filo invitis min, por mi transprenu la esperantlingvajn materialojn. Kiam mi venis, Jan Werner jam estis hejme, svelta, eleganta, ridetanta viro, ĉia kritikemo estis for. Li nur plendis pri sia memoro kaj ke li ne povas eĉ legi, ĉar tio tre lacigas lin. Li ĝojis, ke li post semajno foriros al azila domo, kie li povos interparoli kun aliaj maljunuloj. Post lia foriro al la azildomo lia filo alveturigis al mi dekon da skatoloj kun esperantaĵoj. Post du monatoj ankoraŭ du aliajn, kiujn li trovis, kaj diris al mi, ke la patro en la azildomo falis kaj nun li nur kuŝas. Pro koronaviruso estis vizitoj malpermesitaj, kvankam pluraj esperantistoj deziris lin viziti.

La 20-an de januaro 2021 li forpasis kaj la funebran ceremonion la 27-an de januaro povis partopreni nur 14 personoj, inter ili tri esperantistoj.



